# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-12 n-ro 353

## Jemeno: La Unuiĝintaj Nacioj postulas remalfermadon de la teraj, maraj kaj aeraj aliroj



39a Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Parizo

Genoj indikas eblan graskorpecon

Papo Francisko decidis malpermesi la vendadon de cigaredoj en Vatikano

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉёnkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Jemeno: La Unuiĝintaj Nacioj postulas remalfermadon de la teraj, maraj kaj aeraj aliroj
*Humanitara krizo en Jemeno p. 03*

39a Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Parizo
*De la 30-a de oktobro ĝis la 14-a de novembro p. 04*

Papo Francisko decidis malpermesi la vendadon de cigaredoj en Vatikano
*Ekde 2018 p. 04*

Genoj indikas eblan graskorpecon
*Epigenetika profilo p. 05*

Hodiaŭe
*Frederic Pujulà i Vallès; Michael Ende; Vladimir Varankin; kaj Trajno p. 06*

# Jemeno: La Unuiĝintaj Nacioj postulas remalfermadon de la teraj, maraj kaj aeraj aliroj

La humanitara krizo en Jemeno kaj la blokado trudita de Sauda Arabio de post dimanĉo 5a de novembro, estis la centra temo de la pordfermaj interparoladoj de la Konsilio pri sekureco, merkredon la 8an de novembro [2017]. Petite de Svedio, la 15 membroj akordiĝis por postuli ĉesigon de la blokado. Tamen, por domaĝi la saudan aliancanon je tro viglaj kritikoj, ili ankaŭ kondamnis la misilon pafitan de la jemenaj ribeluloj Hutioj, pro-iranaj, kiu estigis tiun eskaladon da streĉiteco.



Videble ĝenate de tiu nova krizo, la diplomatoj kuniĝis private pri la humanitara temo, la sola kiu ebligas unuanimecon pri la Jemena dosiero en la Konsilio pri sekureco.

UN do unuvoĉe postulis la remalfermon de la teraj, maraj kaj aeraj aliroj al Jemeno por ebligi eniron de la helpo, sen kio la lando povus sperti, laŭ la ĉefo de la humanitaraj operacioj Marc Lowcock, la «plej teruran malsategon de la lastaj jardekoj» Malsatego, kiu povus okazigi laŭ ĝi, milionojn da pliaj viktimoj, dum la lando estas jam detruita: 21 milionoj da personoj bezonas urĝan nutraĵhelpon, 7 milionoj suferas pro malsatego.


Cele plifortigi la premon, la ĝenerala sekretario, António Guterres, kontaktis la Saudan ministron pri fremdaj aferoj. Tiu ĉi ŝajne certigis, ke la blokado estos nur «portempa», pruvo de la relativa nepuniteco, el kio profitas Sauda Reĝlando, grava donacanto al UN, kaj kiu havas gravajn aliancanojn, kiel Usono, Francio, Britanoj kaj Egiptanoj en la Konsilio.

La lando spertas la plej gravan humanitaran krizon en la mondo. 21 milionoj da personoj bezonas humanitaran helpon, kaj 7 milionoj suferas pri malsatego. Krom la bazaj humanitaraj helpoj, fuelo mankas. Soumaja Beltifa, estas proparolanto de la Internacia komitato de la Ruĝa-kruco en Sanao, la ĉefurbo, kie regas la jemenaj ribeluloj.

Neniam Milito Inter Ni

## 39a Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Parizo

UEA tenas rilatojn kun UNESKO ek de 1954, kaj niaj delegitoj estas ĉiam tre aktivaj por informi la landajn delegitojn (ministrojn, ambasadorojn) aŭ simplajn oficistojn. En Parizo de la 30-a de oktobro ĝis la 14-a de novembro dekduo da esperantistoj el UEA, TEJO kaj ILEI dividas inter si la taskojn: kontakto kun la delegacioj laŭ la lingvoj, kaj disdono de dokumentoj; interveno en la Komisiono pri Edukado [Klerigo] pri la nepra rolo de la gepatra lingvo en alfabetigo kaj en la Komisiono pri Kulturo pri graveco de la lingvodiverseco por eviti kulturigon tra la lingvo de la plej potenca lando.



Unuafoje, UEA ricevis la rajton alparoli la Plenon dum tri minutoj, la 6an de novembro fine de la mateno. Ĉar finas sian 8-jaran mandaton Irina Bokova, ne mankas al ŝi dankoj kaj komplimentoj pro ŝia mastrumado de UNESKO en kriza momento. Ŝia posteulo estas virino, eksministro pri kulturo de Francio, Audrey Azoulay. Ŝi devos fronti la defiojn de klimatŝanĝiĝo, terorismo (eĉ se tie oni parolas pri perforta ekstremismo) kaj kulturdiverseco.

UNESKO restas idelaboratorio kaj devos eviti politikigon. Malio dankis la engaĝiĝon pri rekonstruo de *Tombuktu* per moda prezento dum kantis kaj muzikis malia duopo. Ankaù nova kaj aprezata estis la intervjuo de la Nobelpremiito Lech Walesa prefere al longa parolado. Elektita kiel Prezidanto de la 39a Ĝenerala Konferenco estas virino el Maroko, s-ino Zohour Alaoui, kiu difinas sin kiel "virino, arabo kaj islamano".

Informilo de Esperanto por UN, n-ro 31

---

## Papo Francisko decidis malpermesi la vendadon de cigaredoj en Vatikano

Ĵaŭde la 9-an de novembro la plej alta estro de Katolika Eklezio, nome Papo Francisko, ordonis la malpermeson – ekde 2018 – pri vendado de cigaredoj en Vatikanurbo, pro la sanproblemoj kaŭzataj de ili.



“La kialo simplas: la Sankta Seĝo ne povas agi favore al afero, kiu ja trafas la sanon de la homoj”, tion asertis per komunikaĵo Greg Burke, la proparolanto de Vatikano.

“Malgraŭ tio, ke la vendado de cigaredoj al oficistoj kaj emerituloj je malalta prezo konsistigas bonan enspezon al Sankta Seĝo, neniu profito praviĝas, se ĝi kostas homajn vivojn”, tion diras la komunikaĵo. Tie la vendejoj estas senimpostaj.

Vatikano havas ĉirkaŭ ses mil oficistojn, kaj ricevas milojn da vizitantoj ĉiutage. Papo Francisko, kiu en juneco estis trafita de sanproblemo ĉe unu pulmo, ne estas fumanto.

En la jaro 2002-a, plifrue ol Itallando, Vatikano aprobis leĝon kontraŭ fumado sur publikaj lokoj.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

# Genoj indikas eblan graskorpecon

Pli kaj pli da homoj en la tuta mondo suferas pro tropezo. Esploristoj tial serĉis vojojn por povi frue ekkoni la riskon pri graskorpeco ĉe infanoj - kaj ili vere trovis ion ĉe certa epigenetika profilo.



Tropezo kaj graskorpeco fariĝas tutmonda problemo. Esploristoj de la universitata kliniko de Munkeno tial demandis al si, kiel manifestiĝas epigenetike precipe la nutrado ĉe infanoj. Ili konstatis ke la grasa maso de infano postlasas tipan epigenetikan profilon sur certaj genoj.

Por la studo la esploristoj analizis testspecimenojn de sango de preskaŭ 400 infanoj en la aĝo de kvin kaj duona jaroj. La knaboj kaj knabinoj disponigas siajn datumojn por eŭropskala studo kiu daŭras jam de pli ol dek jaroj. La infanoj jam ekde la naskiĝo estas pezataj kaj mezurataj ĉiam denove kaj per speciala procedo estas elkalkulata ilia maso de graso kaj de muskoloj. Krome oni precize demandas iliajn gepatrojn kiel la infanoj estas nutrataj kaj kiel la nutrado kaj la pezo de la patrinoj aspektis dum la gravedeco. Tio estas grava, ĉar fakuloj scias ke jam tie okazas la unuaj direktoŝaltoj por posta graskorpeco de la idoj.

Surbaze de epigenetiko la esploristoj analizis la sangon de la infanoj per speciala altteknologia procedo kaj registris pli ol 400 000 lokojn de metilizado en la genaro. Per ekscitoj el la medio certaj ĥemiaj molekuloj algluiĝas al la DNA - aŭ tamen ne. Tiuj metilgrupoj pendas kvazaŭ kiel flagoj sur la genoj kaj povas enŝalti tiujn genojn kaj elŝalti el ili.

Montriĝis ke metiliza skemo ĉe 13 elstaraj lokoj indikas pri la maso da graso. "Tiuj lokoj tiel eble iutage povus servi kiel markiloj por ekkoni frutempe infanojn, kiuj kun certa probableco povus fariĝi tropezaj", esperas epidemiologo en infana hospitalo en Munkeno. La 12 lokoj troviĝas sur aŭ apud genoj kiuj asociiĝas kun la metabolo de graso kaj sukero.

"Niaj eltrovoj", daŭrigas la esploristo, "subtenas tezon laŭ kiu la posta grandeco de la korpo kaj la pezo estas programataj epigenetike jam dum fruaj vivojaroj". Sed ĉar metilizaj skemoj estas varieblaj, ili povas ŝanĝiĝi denove per bona kaj ekvilibrita nutrado. Tio estas la bona novaĵo.

Do graskorpeco ne estas neinfluebla sorto, sed eblas eviti ĝin per korekto de la vivostilo. Tio tamen postulas konscion pri la minaco kaj la deziron eviti tropezon kaj graskorpecon. Se en familio jam la gepatroj suferas pro graskorpeco, ili verŝajne ne kapablos eduki siajn infanojn al pli sana vivostilo. Kaj la lernejoj povas influi tion nur iomete.

Esperanta Retradio




## Frederic Pujulà i Vallès

**Frederic Pujulà i Vallès (*Palamós* je la 12-a de novembro 1877, *Bargemon*, *Var*, Francio, je la 14-a de februaro 1963) estis katalunisto kaj esperantisto.**

**En Esperanto aperis pluraj verkoj.**

**Vikipedio**

## Michael Ende



**Michael Ende [MIhael ENde] (naskiĝis la 12-an de novembro 1929 en *Garmisch-Partenkirchen*, mortis la 28-an de aŭgusto 1995 en *Filderstadt* apud Stutgarto) estis germana verkisto.**

**En Esperanto aperis: *La senĉesa rakonto*.**

**Vikipedio**



## Vladimir Varankin

**Vladimir Valentinoviĉ Varankin (naskiĝis la 12-an de novembro, 1902, mortis la 3-an de oktobro, 1938) estis rusia verkisto de literaturo en Esperanto, docento de la okcidenteŭropa historio, direktoro de Moskva Ped. Instituto por fremdaj lingvoj.**

**En Esperanto aperis: *Teorio de Esperanto; Metropoliteno; Esperanto por laboristoj*.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

**Trajneto de *La Rhune***

**(Nord-Eŭskio).**

**Vikipedio**